

BULTENO

de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto
Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



Jarkunsido de 2018 okazos en Seatlo

La 59-a AAIE-jarkunsido okazos je la 15-a de Julio 2018 dum la landkongreso de Esperanto-USA en Seatlo, Vaŝingtonio.

Tiu landkongreso okazos ĉe Seattle Pacific University, 3307 3rd Avenue West, Seattle WA 98119 ekde la 13-a de Julio 2018.

La AAIE-jarkunsido komenciĝos je 9:30 atm (laŭ la usona pacifika horzono) dimanĉon, la 15-a de Julio, en Bertona Halo, Ĉambro unu. Ĝi finiĝos je 10:30 atm. La tagordo aperas sur paĝo 2 de ĉi tiu *Bulteno*.

Bv rimarki: AAIE-membroj kiuj ne estos en Seatlo rajtos partopreni la AAIE-jarkunsidon uzante ZOOM; vidu la tagordon sur la sekva paĝo por instrukcioj

Annual meeting for 2018 will take place in Seattle

The 59th annual meeting of AATE will take place on the 15th of July 2018 during the national convention of Esperanto-USA in Seattle, Washington.

That national convention will occur at Seattle Pacific University, 3307 3rd Avenue West, Seattle WA 98119 starting the 13th of July 2018.

The AATE annual meeting will begin at 9:30 a.m. PDT on Sunday, the 15th of July, in Berton Hall, Room 1. It will finish at 10:30 a.m. The agenda (in Esperanto) appears on page 2 of this issue.

Please note: AAIE members who will not be in Seattle have a right to participate in the AAIE annual meeting by using ZOOM; see the agenda on the next page for instructions.

Tagordo de la 59-a Jarkunsido de AAIE je la 15-a de julio 2018 en Seatlo

Bonvolu rimarki: AAIE-membroj kiuj ne estos en Seatlo rajtos partopreni la AAIE-jarkunsidon uzante ZOOM per la retejo <https://zoom.us/j/990418505> (la litero post ".us/" estas "j" kiel en "jen") aŭ telefone ĉe 1-669 900 6833. (Kiam petata, eniru la kunvenkodon "9900418505#". La kunveno komenciĝos je 9:30 atm laŭ la usona pacifika horzono (je 12:30 ptm en orienta Usono).

1. Prezento de la AAIE-Estraranoj por 2016-2018 kiuj povas esti en Seatlo: Ron Glossop (Prezidanto), Filipino Dorcas (Vic-Prezidanto), Chuck Mays (Kasisto), Dorothy Holland (Koresponda Sekretario), Ruth [Margo] Keves-Cohen (Eduka Sekretario), Gary Grady, Redaktoro de AAIE-Bulteno.

2. Aprobo de la protokolo de la 58-a jarkunsido en 2017. [Vidu sube.]

3. Raporto de la Prezidanto. [Vidu sube.]

4. Raporto de la Kasisto. [Vidu sube.]

5. Raporto pri la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

6. Elekto de AAIE-Estraranoj por 2018-2020.

6a. Chuck Mays (Estro) kaj Kandidatiga Komitato rekomendas:

Por Prezidanto: Vilĉjo Harris

Por Vic-Prezidanto: Thomas Alexander

Por Kasisto: Chuck Mays

Por Eduka Sekretario: Margo Cohan

Por Koresponda Sekretario: Charlotte Burton

Por Redaktoro de AAIE-Bulteno: Charlotte Burton kaj Gary Grady

6b. Ĉu estas aliaj proponoj por tiuj AAIE-Estraranoj dum la periodo 2018-2020?

6c. AAIE-membroj kiuj ne povos esti en Seatlo por la 2018 jarkunsido rajtas sendi paperan balotilojn al Ben Speakmon, 2410 N. 38th St., Seattle WA 98103. Li devas ricevi ilin antaŭ la 13-a de Julio 2018. Eblas ankaŭ sendi voĉdonojn perrete al rglossop@mindspring.com.

6d. Voĉdonado de partoprenatoj.

6e. Anonco de la rezultoj de la elektado de estraranoj laŭ la balotiloj de la ĉeestantoj kaj de tiuj, kiuj sendis ilin rete aŭ poŝte.

7. Nomumado de du AAIE-Reprezentantoj al ILEI-Komitato de la AAIE-Prezidanto. La nunaj proponitaj reprezentatoj estas Duncan Charters kaj Enrique Ellember. Se ne estos protesto, la Prezidanto nomumos ilin.

8. PRELEGETO/DISKUTO - Duncan Charters, "Kiajn kulturajn faktojn, spertojn kaj trejnadon ricevu lernantoj en Esperanto-kursoj?"

9. Fermo de la 59-a jarkunsido de AAIE.

Protokolo por la 58-a Jarkunsido de AAIE (2017)

La 58-an jarkunsido de AAIE komenciĝis je la tria horo kaj duono p.m. sabaton, la 1-an de Julio 2017 en la klasĉambro "Don Houpe" de la Konstruaĵo Flowe, William Peace University, 15 East Peace Street, Raleigh, North Carolina 27604. Ĉeestis dudek homoj.

AAIE-Prezidanto Ronald GLOSSOP prezentis sin kaj la aliajn AAIE-Estraranojn por la trijara periodo 2016-2018: Vic-Prezidanto Filipino DORCAS, Kasisto Chuck MAYS, kaj Eduka Sekretario Ruth (Margo) KEVESS-COHEN. La Koresponda Sekretario Dorothy HOLLAND ne povis veni al la 2017 jarkunsido. Post la jarkunsido Gary GRADY indikis ke li denove estos Redaktoro.

La protokolo de la 57-a AAIE-jarkunsido en Miami, Florida je la 9-a de Junlo 2016 estis aprobata.

La skribita jarraporto de la AAIE-Prezidanto kaj lia jarraporto pri la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj estis distribuataj, kaj estis neniuj sugestoj por ŝanĝoj.

Jen la raporto provizata de la AAIE-Kasisto Chuck MAYS:

KASISTA RAPORTO por 2016-2017 (01 majo 2016 ĝis 30 aprilo 2017)

SALDO je 31-12-2009	\$ 3,880.07	SALDO je 12-31-2010	\$ 3,359.62
SALDO je 31-12-2011	\$ 2,780.94	SALDO je 01-05-2012	\$ 2,572.96
SALDO je 01-05-2013	\$ 3,434.01	SALDO je 01-05-2014	\$ 3,621.29
SALDO je 01-05-2015	\$ 3,814.20	SALDO je 01-05-2016	\$ 3,994.58 (Noto 1)
SALDO je 01-05-2017	\$ 3,832.42		

Enspezoj

Kotizoj por 2017	\$ 475.00
Donacoj	0.00
Totalo:	\$ 475.00

Elspezoj

ILEI kotizoj	\$ 426.90
Bulteno	0.00
Alia	9.04
Edukado	201.22 (Noto 2)
Totalo:	\$ 637.16

SALDO je 5-1-2017 \$ 3,832.42 (\$3,994.58 + \$475.00 - \$637.16 = 3,832.42)

Profito (Malprofito) en 2016:(\$162.16)

(Kotizaj enspezoj dum 2016 - ILEI 2014-aj kotizoj): (\$ 475.00 - \$ 426.90 = \$ 48.10)

Notoj:

1. La AAIE-konto nun estas ĉe E-USA. Ni ne havas apartan konto ĉe banko pro la bankaj kotizoj.
2. Financa subteno por Hanso Beklin kaj Tomaso Alexander en la KER ekzamenoj

Chuck Mays, AAIE Kasisto, 25 majo 2017

(La protokolo estas daŭrigota sur la sekva paĝo)

De la Redaktoro

Mi forte bedaŭras la neaperon de la *Bulteno* dum tre longa periodo, kaj ankaŭ la malfruecon de ĉi tiu numero.

En tiu tempo mia plej juna frato mortis post longa batalo kontraŭ kancero de la cerbo, mi poste suferis iom da damaĝo al miaj kruroj en trafikakcidento (alia aŭto forte batis mian de malantaŭe), kaj mi havis kelkajn aliajn negravajn sed ĝenajn sanproblemojn.

Sed por paroli honeste, tiuj aferoj ne senkulpigas min pri la prokrasto de la *Bulteno*.

Bonŝance troviĝis alia persono kiu baldaŭ fariĝos la nova redaktoro, kiun me strebos asisti. Mi esperas, ke nova numero baldaŭ aperos.

Intertempe, mi planas blibonigi nian retejon ĉe <http://aaie.us>

La kasista raporto estis aprobata.

Prezidanto GLOSSOP anoncis la la AAIE-reprezentantoj al ILEI ĉijaron estos Duncan CHARTERS kaj Ronald GLOSSOP.

La ĉefa afero de la 2017 AAIE-jarkunsido estis panela diskuto "Kiel Instrui Esperanton en Mondo de Moderna Medio?" Membroj de la panelo estis Margo Keves-Cohen, Lee Miller, kaj Duncan Charters. Katalin Kovats ne povis rekte partopreni kiel planite pro problemo kun flugo. Ŝi alvenis al la kongreso sed nur post la AAIE-jarkunsido.

Tamen Katalin povis partopreni la diskuton per filmo ĉe YouTube dum kiu ŝi parolis dum 12 minutoj pri la nova programo EKPAROLU. Tiu programo provizas manieron per kiu novaj Esperantistoj povas interparoli Esperante kun veteranoj kaj spertuloj.

Margo provizis informon pri la historio de Duolingo. Ŝi diris ke la fondinto estas Luis von Ahn kaj ke la jaro de la lanĉo estis 2012 kaj ke la sidejo estas en Pitsburgo. Chuck Smith estis la unua moderato por la kurso pri Esperanto, kaj Margo nun estas la respondeculo pri ĝia enhavo. Estas multaj helpantoj kaj helpintoj. La kurso pri Esperanto por angloparolantoj komenciĝis je la 28-a de Majo 2015. Jam pli ol 850,000 lernantoj komencis ĝin kaj 100-150 finas ĝin ĉiutage. Kurso por hispanlingvanoj haveblas, kaj oni nun preparas kurson por portugallingvanoj. Utila retejo por tiuj lernantoj estas "afterduolingo.com" kiu enhavas longan liston de esperantaj lerniloj, organizaĵoj, eventoj, ktp. Margo emfazis, ke la celo de Duolingo estas instrui la lingvon mem, ne la kulturon; sed oni provas ankaŭ enkonduki historion kaj kulturon kiam eblas. Ŝi ankaŭ rimarkis ke multaj aliaj helpantoj estas bezonataj. Baldaŭ nova dua versio por Esperanto estos havebla. Margo indikis, ke ŝi baldaŭ verkos mallongan artikolon por AAIE-membroj pri kiel ili povus helpi pri la demandoj kaj problemoj de novaj Esperantistoj kiuj eklernas Esperanton per Duolingo.

Liĉjo Miller parolis pri la valoro de Duolingo al Esperanto. Preskaŭ miliono da homoj jam lernis Esperanton. Ĉe <<https://www.duolingo.com/comment/10334863/Finished-the-Esperanto-tree-now-what>> vi povas vidi komentojn de tiuj kiuj studis Esperanton. Nun ekzistas ret-komunumoj kaj kelkaj lokaj grupoj. Estas nova respekto por Esperanto kaj ĝiaj spertuloj kiel Bertilo Wennergren. Nun estas nova premo por bona materialo legi kaj por bonaj instruistoj/instruantoj (geonkloj) por respondi al demandoj de lernantoj. Liĉjo mem estas tre okupita rilate al tiaj demandoj. Se vi volus helpi lin, vi povus kontakti lin perrete ĉe

<licxjo@gmail.com>. Liĉjo indikas ke persona kontakto estas tre grava afero por kuraĝigi pluan lernadon kaj uzon de Esperanto. Ankaŭ Liĉjo emfazis ke Duolingo nur instruas la lingvon mem kaj provizas nenion pri la kulturo kaj movado. Tiun taskon estas la nia!

Duncan Charters diris ke ni devas memori ke la teknologio rapide ŝanĝiĝas, do Esperantistoj kiuj volas instrui la lingvon devas konatiĝi kun la plej lastatempaj evoluoj. Li rimarkis ke unu tre bona nova programo estas Ekparolu <<http://edukado.net/ekparolu/prezento>> kiun Katalin Kovats lastatempe lanĉis. Ĝi permesas novajn Esperantistojn komuniki per Skajp kun spertaj malnovaj Esperantistoj. Li remarkis ke novaj Esperantistoj devas havi ŝancon paroli la lingvon, ne nur legi kaj aŭskulti ĝin. Li ankaŭ diris ke ni devas lerni tri lecionoj de poliglotoj. (1) Motivado estas plej grava faktoro. Ne ĉiuj devas havi la saman motivon, sed sen motivo lernado ne okazos. (2) Hejmverko devas esti interesa. Bona rakonto kiel en la video "Pasporto al la Tuta Mondo" multe helpas. (3) Por lerni novan lingvon, plej bona maniero estas studi ĉiutage denove kaj denove dum mallongaj periodoj, ne pli longa ol 20 minutoj. Ankaŭ devus esti ĝojo en la sukcesa lernado de la lingvo. Duncan ankaŭ diris ke Esperanto-USA devus krei novan organizan stukturon por la multaj novaj Esperantistoj pro Duolingo.

Ĉiuj opiniis ke la panela diskuto estis tre utila afero.


La fermo de la 58-a jarkunsido de AAIE okazis je la kvara horo kaj duono pm.

Ronald Glossop, Sekretario Provizora

Esperanto Variety Show ĉe YouTube

YouTube enhavas pli kaj pli da videoj en kaj pri Esperanto, inkluzive la kanalon "Esperanto Variety Show" de AAIE-membro Tomaso Alexander. Laŭ la priskribo de la kanalo en YouTube:

"Tomaso (a.k.a. 'Salivanto') wants you to be the best Esperanto speaker you can be. I've gotten a tremendous response to the Esperanto videos on my music channel (MrTwostring) and it has become clear that this kind of material warrants its own channel. The goal is the same as always - to be a true "Variety Show" for Esperanto – with music, skits, entertainment – and of course Esperanto lessons, Esperanto learning, and Esperanto conversation."



Dum NASK en Raleigh ĉi-jare Tomaso instruas la kurson por komencantoj, kaj fine de ĉiu tago li prezentas en la kanalo resumon de la instruado dum la tago.

La plej facila maniero trovi la kanalon estas simple serĉi YouTube por la vortoj "Esperanto Variety Show."

Raporto de la Prezidanto, Lasta Parto de 2017 kaj Unua Parto de 2018

Mi volas informi AAIE-membrojn pri agadoj rilate al AAIE kaj Esperanto post la AAIE-jarkunsido en la jaro 2017 ĝis nun, la 15-a de Julio 2018.

Dum 2017 la 58-a AAIE-jarkunsido okazis je la unua tago de Julio en Raleigh, Nord-Karolino dum la landkongreso de Esperanto-USA. La ĉefa afero estis panela diskuto pri "Kiel Instrui Esperanton en Mondo de Moderna Medio?" La prezentantoj estis Katalin Kovats, Duncan Charters, Margo Keves-Cohen, kaj Lee Miller. AAIE provizis financon subtenon por 2 homoj kiuj faris la KER-ekzamenon. Nova aranĝo estas ke homoj nun povas aliĝi al AAIE per uzo de la retbutiko de Esperanto-USA.

Dum la tria semajno de Julio 2017 Vilĉjo HARRIS kaj mi partoprenis la gravan 50-an ILEI-konferencon en Busano, Koreio. Dum la lasta semajno de Julio 2017 ni kune partoprenis la UK-on en Seulo, Koreio inkluzive la Mondan Foiron je la komenco de la UK. En tiuj du konferencoj ni instruis kelkajn kursojn por komencantoj kaj partoprenis diskutojn.

Mi verkis artikolon "Pri la organizaĵo "Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo" kiu aperis en *IPR* 2017/3. paĝoj 22-25. Tiu artikolo efektive estas la prelego kiun mi prezentis je 27 Julio 2017 kiel parto de la simpozio "Nuna stato kaj evoluo de la instruado de E-o kiel internacia lingvo en la tuta mondo" organizita de HANKUK-Universitato pri Fremdaj Studoj kaj ILEI dum la UK.

En Aŭgusto 2017 mi sendis raporton al AAIE-membroj pri tiuj du konferencoj en Koreio.

Dum 2017-2018 Vilĉjo Harris denove servis kiel la financa administranto de ILEI.


Unu tasko por AAIE-Kasisto Chuck MAYS kaj mi dum kelkaj monatoj je la komenco de la jaro 2018 estis kompili liston por ILEI de AAIE-membroj, poŝtadreso, retadreso, kaj telefon-numeroj. La limdato por tiu raporto estas la fino de Marto, sed poste ni finis tiun taskon.

Chuck MAYS ankaŭ multe helpis min rilate al la AAIE-jarraporto al ILEI pri niaj agadoj dum la jaro 2017. La cefaj aferoj estis NASK kaj la laboro de Chuck MAYS kiel la AAIE-kasisto. Kompreneble dum la jaro estis aliaj edukaj agadoj en lokoj kiel norda Teksaso; la Bostona regiono; Seatlo, Vaŝingtonio; kaj Portlando, Oregono. Ĉie AAIE-membroj agas individue kiam ajn ebleco ekzistas por antaŭenigi Esperanton. AAIE-Vic-Prezidanto Filipino Dorcas kaj aliulaj AAIE-membroj kunlaboras kun Esperantistoj kiuj lernis la lingvon per Duolingo. AAIE-membro Duncan Charters partoprenis diversajn konferencojn tra la mondo pri Esperanto kaj la instruado de fremdaj lingvoj.

Mi mem ankaŭ estris la organizaĵon "Infanoj ĉirkaŭ la Mondo" <www.icxlm.org> kaj rilate al tio sendas edukajn materialojn kaj mon-helpon al geinstruistoj de Esperanto en Ruando, Kongo Demokrata Respubliko, Ugando, Malavio, kaj aliaj afrikaj landoj.

Bedaŭrinde mi nun ne plu povos vojaĝi al aliaj landoj, do mi opinias ke AAIE bezonas novan Prezidanto por la estontaj jaroj.

Ronald GLOSSOP, AAIE-Prezidanto



Raporto de la Kasisto de AAIE por 2018

KASISTA RAPORTO por 2017-2018 (01 majo 2017 ĝis 30 aprilo 2018)

SALDO je 31-12-2009	\$ 3,880.07	SALDO je 31-12-2010	\$ 3,359.62
SALDO je 31-12-2011	\$ 2,780.94	SALDO je 01-05-2012	\$ 2,572.96
SALDO je 01-05-2013	\$ 3,434.01	SALDO je 01-05-2014	\$ 3,621.29
SALDO je 01-05-2015	\$ 3,814.20	SALDO je 01-05-2016	\$ 3,994.58
SALDO je 01-05-2017	\$ 3,895.60	SALDO je 01-05-2018	\$ 3,915.48

Enspezoj

Kotizoj por 2017:	\$ 550.00
Donacoj:	75.00
Totalo:	\$ 625.00

Elspezoj

ILEI kotizoj:	\$ 605.12
Bulteno	0.00
Totalo:	\$ 605.12

SALDO je 01-05-2017 \$ 3,915.48 ($\$3,895.60 + \$625.00 - \$605.12 = 3,915.48$)

Profito (Malprofito) en 2018: \$19.80

Dankon al ĉiuj, kiuj realiĝis dum la jaro.

Noto:

1. La AAIE konto nun estas ĉe E-USA.

Chuck Mays, AAIE Kasisto, 3 julio 2018

Raporto pri la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Ĉiuj AAIE-membroj aŭtomate estas membroj de ILEI. Sekve ĉiuj AAIE-membroj ricevas la organon de ILEI, la kvaronjaran bonegan revuon *INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)*. ILEI ankaŭ eldonas la bonan kvaronjaran revuon *JUNA AMIKO* por junaj Esperantistoj.

Ĉi-jare ILEI okazigas ĝian konferencon en Madrido je 21-28 Julio antaŭ la UK en Lisbono.

Se vi legos *IPR*-on, vi ricevos multe da informo pri la instruado de Esperanto tra la tuta mondo. Eĉ se vi ne instruas kaj neniam planas instrui Esperanton, vi tamen trovos ke *IPR*, la organo de ILEI, estas valora kaj interesa fonto de informo pri Esperanto en la nuna mondo.

Ronald GLOSSOP, AAIE-Prezidanto

On-line tools for organizing local groups and classes

A common topic of discussion in AAIE has been how to make people aware of Esperanto in general and local groups and classes in particular. A number of services are now making this much easier, including **Duolingo** and **Ekparolu**, both mentioned earlier in this issue. Almost all of them can be accessed both via websites and by using their dedicated smartphone apps. Some are aimed at local in-person meetings and classes, while others support contacts on line, including via multi-person video calls among people anywhere in the world with Internet access.

Meetup

Meetup.com is a service that helps local groups of all sorts announce meetings, maintain membership lists, and so on. Members get automatic announcements and reminders of meetings, and Meetup tries to make it easy to find groups that might interest them. The Raleigh-Durham-Chapel Hill group, for example, acquired more than 80 members of its Meetup group in less than two years, almost all as a result of people finding it via Meetup itself. It costs nothing to join Meetup as an individual, but groups have to pay semi-annually, with prices starting at \$10 per month for up to 50 members and \$15 for unlimited. (Note that Duolingo also permits local groups to announce Esperanto-related events in a fashion similar to Meetup for free.)

Lernu.net

Established in 2002, the Esperanto-teaching website Lernu.net is less well known among the broad public than Duolingo, but it has a large number of Esperanto courses and other materials of use to learners. There are more than a quarter-million registered users. The "News" forum carries announcements about local and national Esperanto meetings and courses.

Skype, Google Hangouts, Zoom, YouTube, and similar services

When people can't meet in person they can join in group conversations via the Internet ranging from live broadcasts on YouTube to conversations by voice and optionally video on other services. Many services are free (sometimes with a limited number of participants) while others, such as ZOOM, cost money but may be more reliable. Participants in video conferences can use a smart phone or a computer with built-in or add-on camera (some of which are very inexpensive). A headset with built-in microphone can be helpful but often isn't necessary.

In future issues of the *Bulteno* we'll discuss in more detail various ways of using these services to find students and teach Esperanto, especially Esperanto conversation, something hard to learn on one's own.

Por membriĝi aŭ remembriĝi en Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto por la jaro 2018, bv viziti la retejon retbutiko.esperanto-usa.org kaj elekti "AAIE/AATE Memberships" el la listo maldekstre de la paĝo. Per membriĝi po'ste, sendu vian nomon, adreson, retadreson, kaj telefonnumeron kune kun la jarkotizo (\$50 por paperaj eldonaĵoj aŭ \$25 por elektronikaj) al Chuck MAYS, 16 Dixie Trail, Raleigh NC 27607, Usono. Membroj de AAIE estas aŭtomate ankaŭ membroj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj ricevas ties organon, *Internacia Pedagogia Revue*.